Aŭstria Esperantisto

Oficiala organo de Aŭstruja Esperanto-Delegitaro (A. E. D.), Esperanto-Delegitaro de Wien (E. D. W.) kaj Universala Esperantista Pacifista Ligo (U. E. P. L.)

2ª jaro. No. 4 **Monata** **Aprilo 1925**

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Hovengasse 12, II, 13

Kunlaborantoj! Skribu legeble, retenu kopion, aktualaĵojn sendu ĝis la 1ª de l' monato. Manuskriptoj ne resendataj.

Jarabono: Por Aŭstrianoj aŭ. S 3, Germanoj g. or. M 2, Alilandanoj sv. fr. 3.50.

RADIO-PAROLADO DE D-RO EDMOND PRIVAT.

La 14. aprilo je la 20^{20}—20^{28} M. E. T. s-ro d-ro E. Privat parolis sur ondo 1750 per Radio Paris salutvortojn al la tutmonda Esperantistaro:

Karaj samideanoj, tre estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj.

Jus fininte konferencon de Radio-amatoroj kaj juristoj mi havas la okazon paroli al vi per Radio-Paris, el tiu urbo, kie nia majstro d-ro Zamenhof solene estis akceptata kaj entuziasme salutata okaze de la unua kongreso en la jaro 1905. Oni honoris lin tie ĉi, li manĝis en la plej alta ĉambro sur Eifelturo kaj vizitis ĉiujn grandajn konstruaĵojn.

Multaj jaroj pasis de tiu ĉi tempo, Zamenhof kaj lia aminda edzino ne plu vivas. Li neniam havis la mirindan okazon paroli per elektraj ondoj al siaj adeptoj.

Ne sonos la milda voĉo al ni de tiu modesta viro, kiu dediĉis sian tutan vivon al nia granda bela ideo, kiu nenion alian deziris ol esti utila al ĉiuj homoj, ne nur al inteligenteco sed al la tuta homa popolo.

Ho, kiel kore li estus demandinta: „Kiel vi fartas, kion vi faras miaj karaj gesamideanoj en ĉiuj landoj?“

Ni respondus al li: „Ni ankoraŭ laboras, ni daŭrigas vian laboron kaj celadon. Novaj adeptoj aliĝis kaj kun ili ni plu laboras por via bela kaj granda ideo. Ni uzas por nia laboro la plej modernan rimedon, la Radiofonion.

En la mondon venis nova sento,
tra l' aero iras forta voko,
per la senfadenaj ondoj,
nun de loko flugu ĝi al loko“.

Ni dezirus, ke tiu kulturilo baldaŭ estu ĝenerale uzebla por niaj delegitoj, por faciligi al ili la laboron, tiun malfacilan, malagrablan laboron. Ni esprimas al ili nian dankon pro ilia senlaca agado, tutkore ni dankas ilin, ĉar pro ilia laboro ni povas havi konstante la konscion, ke nia afero bone marŝas en la tuta mondo.

Nun mi adiaŭe salutas vin, vin ĉiujn, karaj amikaj samideanoj.

Bonan vesperon!

Ĝis revido!

Al kompleza disponigo de tritubaparato flanke de s-ro ministr. kons. inĝ. Friedrich Roth en Bisamberg ni dankas, ke ni povis aŭskulti la vortojn de nia d-ro Privat.

Raportantoj *Smital*-Wien, *Steiner*-Bisamberg.

LA MALŜPARULO DE FERDINAND RAIMUND,

okaze de la XVI. E. K. en Wien.

La estiĝiro de teatroprezentado.

En novembro 1923 la Wien-a L. K. K. invitis min, araĝi okaze de la XVI. E. K. la prezentadon de „La Malŝparulo“ kaj mem ludi en ĝi la komikan ĉefrolon.

La Malŝparulon oni elektis kiel festprezentaĵon, ĉar oni volis montri al la kongrespartoprenantoj Wien-an originalaĵon kaj, ĉar ĝuste en ĉi tiu verko vera aŭstra poeto, kiel ideala malŝparulo, elŝutis plenmane la trezorojn de sia humoro, de sia animo, de siaj fantazio kaj realismo. Oni komisiis al mi la taskon, ĉar mi depost jaroj ludadas la diritan rolon en „Burgtheater“ — W i e n kaj miaj intimaj rilatoj al aŭstra poezio estas konataj. Oni planis la prezentadon kun profesiaj aktoroj, ĉar oni precipe en Wien, en la mondkonata muzik- kaj teatrourbo, ne povis ludigi diletantojn. Ĝis tiam mi ne estis Esperantisto; apenaŭ mi iom aŭdis pri ĉi tiu lingvo — ĝustadire nur malfavoraĵojn. Nun oni rakontis al mi pri imponaj kongresoj, pri la konstanta disvastiĝo, koncize — mi lernis ekkoni la Esperantomovadon kiel ion realan, grandiozan kaj ne kiel fantomon, kia ĝin ŝajnigas la kontraŭuloj. Ĝoje mi diris „jes“ al ĉi tiu honoroplena invito, ne konjektante en la unua entuziasma ekstazo, per kia giganta pezego mi estis min ŝarĝinta.

Nun venis la momento por lerni Esperanton, ĉar fine, kiel gvidanto de l' tuto mi devis antaŭeniri kun bona ekzemplo, lertiĝi ĉiurilate kaj elprovi la aferon unuavice je mi mem. La enfundiĝema tradukinto de „La Malŝparulo“ (kolonelo Zwach) estis mia instruanto — mi akcentas: ideala instruanto! Kiel mirfacile lerniĝis ĉi tiu lingvo, kian ĝojon okazigis la rapida progreso — post malmultaj lecionoj konstruiĝis ĉio per si mem. Fakte mi lernis helpe de mia rolo, kiel poste la aliaj kunludantoj helpe de la siaj; certe la plej bona metodo, esti rapide kaj funde enkondukata en la fremdan lingvon. Spertinte nun je mi mem, ke Esperanto estas facile lernebla — kaj kontraŭ miaj unuaj duboj — absolute belsona kaj plene taŭga por la redono de l' teatraĵo, mi devis ekserĉi miajn multnombrajn necesajn kunludantojn. La elekto estis apriori limigita, ĉar mi rajtis preni nur profesiajn aktorojn. Jen mi faris tute strangajn spertojn koncerne la propagandon! Unue mi volis grandageste interesigi mian tutan kolegaron, esperante ricevi tiom da anoncoj, ke mi povas okupigi ĉiun rolon per relative plej konvena artisto. Per la sekretariejo de mia profesia organizo mi igis disendi alvokojn al ĉiuj Wien-aj teatroj, krom tio aperigi varbatikolon en nia fakgazeto kaj vidu jen — el la ĉirkaŭ mil scenartistoj de Wien, anoncis sin kvin personoj. Mia tuta grandplana propagando, kiu kostis tempon, monon kaj laboron, estis vana. La unuan fojon mia entuziasma „jes“ komencis pentigi min. Oni imagu esti en mia situacio kiel reĝisoro, se por tridekkvin roloj estis al mi disponataj kvin aktoroj. Mi do ne povis mortintigi tridek personojn antaŭ la leviĝo de l' kurteno! La situacio estis nenio malpli ol gajiga. Ke mi fine tamen havis ĉiujn necesajn personojn, estis la rezultato de intensa propagando persona kaj mi konsideras ĝin grava, tie ĉi publikigi ĉi tiun sperton por bono kaj disvastiĝo de Esperanto. Mi nur tiel atingis la celon, ke mi persvadis ĉiun unuopan rekte kaj spite kelka rifuzo, ne malinsistis ĝis kiam mia aro estis kompleta. Jen afero pripensinda: Kiel estus, se ĉiu Esperantisto dum unu jaro varbus ĉirkaŭ tridek homojon de sia konatularo? Mi opinias, ke en mallonga tempo la tuta mondo parolus esperantlingve.

Nun estis araĝata kurso (gvidanto kortega konsilisto Hartwich) kaj baldaŭ ĉiu partoprenanto havis sian rolon en la mano kaj lernis rolon kaj lingvon samtempe. Kompreneble ni devis direkti

nian ĉefatenton al neriproĉinde pura prononcado, ĉar de sur la scenejo paroliĝas tute alie ol en la ordinara konversacio. La provoj intersekviĝis plenaj je ĝojigaj iniciato kaj atendo kaj fine venis la tago de la prezentado. Ĉe la ĝenerala provo ĝustfunkciis nenio. Ĉiu de ni ja sciis sian rolon neriproĉinde, sed tamen ĉiu ekhavis timon, balbutis kaj ekmaldaŭrigis. Nu, al la kompatinda, turmentata reĝisoro hirtiĝis la haroj. Sed la ĉefa malbono estis la kapelestro. La malfeliĉulo ne sciis Esperanton, tial li ne komprenis la ekvortojn por la kantoj kaj por la melodramaj scenoj kaj fuŝigis tiamaniere ĉion. Malgraŭ ĉiu atentemo kaj diligenteco, ni ne pensis pri tio, malkovri al la kapelestro la misteraĵojn de la lingvo. Fine ni forigis ankaŭ ĉi tiun baron, interkonsentinte, ke ni aktoroj donu al la kapelestro kaŝe la eksignojn, anstataŭ inverse — kaj neniu homo rimarkis ion. Fine mi subite eksentis timon, ĉu la vizitantoj el la malproksimaj kaj el la plej malproksimaj landoj entute trovos rilaton al nia teatraĵo kaj al nia prezentado. Mi povas konfesi, ke dum kaj post la ĝenerala provo mi estis fihumora.

La vespero venis, la uverturo ekludiĝis, la kurteno leviĝis susurante, la unuaj paroloj eksonis — kaj jen . . . venis el la rigardantejo al ni tiu fluido, kiu ĉiam ĉeestas, kiam la okazaĵoj sur la scenejo estas plene kaj intime perceptataj de la publiko. Ĉiu spritaĵo estis priridata, ĉiu lirismo kortuŝe akceptata kaj ofte ni povis rikolti aplaŭdon sur malferma scenejo. Unu el la plej aplaŭditaj partoj de la teatraĵo estis la famkonata t. nomata „Rabotilo-Kanto“.

Hermann Wawra

RABOTILO-KANTO

Disputas pri feliĉ' sen fin'
La homoj inter si,
Stultigas reciproke sin
Kaj mem ne scias pli.
Jen estas plej mizera vir'
Al iu riĉa tro,
Sed ambaŭ sort' per unu tir'
Egalrabotas do.

Perforte volas junular'
Feliĉon de l' moment',
Sed kiam pasis kelka jar',
Jam venos la kontent'.
Se la edzino kun pasi'
Disputas, ho terur',
Elfrapas rabotilon mi
Kaj pensas, grumblu nur.

Se l' mort' min iam kun permes'
Tiretos: venu frat',
Ekrestos mi sen interes'
En kvazaŭ surda stat'.
Sed diros ĝi, jam estas hor'
Por iri el la mond',
Mi metos rabotilon for
Kaj sekvos sen respond'.

Kiam la prezentado finiĝis, la aplaŭdo ne volis ĉesi. Ni havis la senton, esti akirintaj per nia ludo ne nur persone, sed ankaŭ por nia hejma poeto kaj antaŭ ĉio por la lingvo Esperanto grandan venkon.

Kiam mi poste havis okazon, paroli kun la rigardintoj, kies landoj kuŝas en

Philipp Zeska

ĉiuj direktoj de la kompaso, kiam mi aŭdis, ke reprezentantoj de romanaj gentoj, anglosaksoj, slavoj, japanoj ktp. ktp., sume, la reprezentantoj de ĉiuj lingvoj kaj nacioj auskultis nian ludon kaj nin komprenis, kvazaŭ ni estus iliaj samlandanoj, tiam min kaptis ektremo de estimego por la genia kreinto de ĉi tiu interkomprenilo, por d-ro Zamenhof, sed tiam ekkaptis min ankaŭ la profunda sento de l' espero, ke venos tempo, kiam per Esperanto ne nur nia arto internaciiĝos, sed ĉiuj homoj efektive fariĝos komunumo de sin reciproke komprenantoj kaj — ĉion kompreni signifas ĉion pardoni — komunumo de la paco. *Herm. Wawra.*

HERMANN WAWRA

Aktoro en „Burgtheater".

Hermann Wawra naskiĝis 1884 en Wien. Unue li studis reallernejon, poste tehnikan altlernejon. Junaĝa li jam sentis profundan inklinon al la teatro. La unuajn paŝojn sur la scenejo li faris okaze de studentaj prezentadoj. Li edukiĝis al aktoro en la akademio por muziko kaj dramarto en Wien. Sukcese li ankaŭ ludis en la opereto. Dum tri jaroj li efikis kiel juneca komikulo en la teatro „an der Wien", poste en Olmütz, Linz, Stuttgart, Berlin; krom tio kondukis lin kelkmonata rondvojaĝo al Rusujo (Moskvo kaj Petersburgo). Depost 1913 li apartenas al „Burgtheater" en Wien, kie li funkcias en komikaj karakterroloj.

PHILIPP ZESKA

Aktoro en „Burgtheater".

Philipp Zeska naskiĝis la 27. aprilo 1896 kiel filo de l' kortega aktoro kaj reĝisoro Karl Zeska. Sian unuan engaĝon li ekokupis 1914 en la teatro en Frankfurt am Main. La 1. marto 1915 li devis eksiĝi de tie pro militalvoko. Ĝis la renversiĝo de la monarhio li restis subarmila; sed li havis la okazon funkcii aktore dum kelka tempo ĉe la frontteatro, instalita en la Bukaresti-a „Teatru National". Post la milito li aniĝis al la novmalfermita „Komedienhaus". 1919 ĝis 1920 li efikis en „Stadttheater" (urba teatro) sub la direkcio de Jarno kaj estis, post la sukcese ludita ĉefrolo en „Freiwild" (libera ĉasaĵo) de Schnitzler, vokita al la „Burgtheater", kie li agadas ĝis hodiaŭ en la roloj de la junecaj herooj.

Kiam oni invitas lin ludi la rolon de Flotwell en la „Malŝparulo" de Raimund en Esperanto, li volonte submetis sin al la peno, studadi la lingvon kaj la rolon, kredante je la granda estonteco de ĉi tiu mondlingvo kaj esperante, altiĝi per ĝi al iternacia aktoro.

„La Malŝparulo" de Ferdinand Raimund trad. de kolonelo F. Zwach-Wien, eldonejo Hirt & Sohn, prezo aŭ S 3·06.

La redakcio.

PRINTEMPE.

F. Zwach-Wien.

Odoras dolĉe la siringo
Kaj verda iĝas la natur',
En foliar' aŭdigas fringo,
Amkanton jam laŭ m o l' kaj d u r'.

En valo rivereto plaŭdas,
Ĉe l' bord 'amflirtas papili'
Kaj en arbaro oni aŭdas
La pegon haki sur abi'.

Jen ĝi preparas molan neston
Kaj penas, baldaŭ fini ĝin,
Por tuj soleni edziĝfeston
Kun sia kara amatin'.

Kaj ĉiu kreitaĵo amas
Ĉirkaŭe en la vasta rond',
Ĉar laute la natur' proklamas:
Per amo renoviĝas mond'.

Ni do imitu la ekzemplon,
Ho mia koramata vi,
Kaj iru en la sanktan templon,
Ke nian amon benu Di'!

ABSTINENCO — SOCIALA DEVO.

Laŭ parolado de s-ro *Wilhelm Börner*, konata etikulo kaj liberpensulo en Wien.

Estas certe sendube, ke inter la legantoj de ĉi tiu gazeto ne ekzistas eĉ unu drinkemulo. Tio estas unurilate tre laŭdinda, sed laŭ alia rilato precize ĉi tiu cirkonstanco enhavas danĝeregon, nome, ke multegaj entute ne perceptas la alkohol-problemon, ke ili ne vidas la efektivan kaŭzon de la afero; kaj la gravega demando estas bagateligata (akcesore traktata).

El ĉi tiu traktado oni devas antaŭ ĉio konsideri tiun eraron, ĉiam unuavice pensi pri si mem. Multaj diras: Mi trinkas nur modere, al mi ne malutilas la malmulto, neniu ankoraŭ ekvidis min ebria. Estante socialaj homoj ni devus honti, tiel pensi. Neniu el ni rajtas esti nur: „Mi"! Laŭ tio ja ekzistas etika-sociala percepto kaj ekago, ke ni ne nur sentas kiel „mi", kiel unuopulo, sed sentas nin parto de komuno, tiel ke ni havu la konscion: Ĉiu nia kunhomo estas al mi konfidita, por ĉiu el ili mi estas kunrespondeca; bonfarto kaj malbonfarto de ĉiu kunhomo dependas de miaj volo kaj konduto.

Estante socialpensantaj ni ne rajtas nur demandi: Kiel efikas mia konduko je mi; ĉu ĝi endanĝerigas min; ĉu ĝi difektas min? Unue mi pripensu, kiel efikas agado mia je aliaj, ĉu ĝi ne malakcelas la aliajn, ĉu ĝi ne mallogas kaj instigas la aliajn?

Se mi esploras la aferon tiel, la alkoholproblemo montriĝas tute alie. Ni supozu, kvankam tio ne estas pruvebla, ke la t. n. „modera" trinkado ne malutilus laŭ ia rilato al la unuopulo. Eĉ se tio estus vera, por socialuloj ĝi ne estu decidiga. Trinkante alkoholaĵojn oni malutilas al la popolo, al la komuno — kaj tio estas la plej gravaĵo. Neniu dubos, ke alkoholaĵoj difektas infanojn kaj kormalsanulojn; kaj ni ankaŭ scias, ke alkoholĝuo efikas sugeste, t. s. ĝi instigas al imitado. El tio rezultas por ni, ke ni ne trinku alkoholaĵojn, pro konsidero, pro zorgemo por tiuj homoj, ke ili ne estu instigataj, por ke ili konsciiĝu pri siaj difektoj; koncize dirite: por doni al ili e k z e m p l o n.

La defendantoj de alkoholaĵoj ĉiam aludas je sciencistoj, kiuj ne estis abstinencaj, kvankam moderaj: Rousseau, Kant, Marx, Darwin, Nietzsche k. a. Jes, se ekzistus en la mondo nur Kant, Marx, Darwin, tiam ja ekzistus entute nenia alkoholproblemo. Ĝi ja nur estas, ĉar la homoj estas senenergiaj, nekonsekvencaj kaj malmoderaj.

Ni ne rajtas simple ignori la fakton, ke multaj homoj estas senvolaj kaj malakceligaj. Ni certe dezirus, ke la homoj fariĝu pli firmvolaj, pli moderaj, pli etikaj laŭ iliaj sentoj. Pro tio ni devas akceli kaj subteni ĉion celservan per ekonomiaj socialaj kaj edukaj iniciatoj.

Sed ni ne eraru nediferencante inter deziroj, esperoj kaj faktoj. Ni scias, ke multaj homoj ankoraŭ estas ne perfektaj kaj kun tio ni devas kalkuli. Kiel mal-

grava estas la ofero — precipe por la moderuloj – entute rezigni je alkoholaĵoj!

Estas malnoble kaj malbone, se ni aprobas alkoholaĵojn aludante je nia klereco, pli bone je nia volforto kaj moraleco. Niaj pli bonaj klereco kaj moraleco ja devigu nin, ne ĉiam pensi pri ni mem, kapabligu nin, ekkoni helokule la esencon de l' alkoholismo kaj instigu nin pruvi la ofereton de abstinenco. Estas sperto malnova, ke nur tiu sukcesas batalante kontraŭ alkoholĝuo, kiu mem estas tute sobra. Oni povas pledi tre bone kontraŭ alkoholĝuo kaj refuti per plej gravaj vortoj — oni ne efikos trinkante mem alkoholaĵojn.

Estas ankaŭ malinde diri: „Atentu miajn vortojn, ne miajn agojn!“ Se mi diras: „Mi trinkas nur modere“; la alia ĉiam demandas: „Kiom vi opinias dirante ‚modere'?“ kaj ni neniam interkompreniĝos! „Modere“ estas necerta aŭ relativa ideo.

Kiu dumvive ne rifuzas ĉiom da alkoholaĵoj, tiu neniam ekhavos konfidon, tiu instigos neniun kaj ne resanigos unu drinkemulon. Ni devas esti abstinencaj por apogi malfortulojn, doni al ili protekton.

Abstinenco laŭ tia senco estas prizorgemo, helpemo, helpegado.

Ekzistas ankoraŭ alia maniero bagateligi la alkoholproblemon. Oni diras: „Je la alkoholo estas la sama kiel je nikotino, kafo aŭ teo. Ili estas venenoj grandkvante konsumataj.“ Kiu parolas tiel, pruvas nur, ke li ne komprenas la tutan aferon. Inter alkoholaĵoj kaj la aliaj „venenoj“ estas principa diferenco, nome: Nikotino, kafo kaj teo estas porindividuaj venenoj, malbonaĵoj kaŭzantaj individuajn suferojn. Amaso da ili difektas unuopulon kaj endanĝerigas lin. Sed alkoholaĵoj estas socialaj malbonaĵoj kaj veneno difektanta la komunecon. Alkoholaĵoj estas komundanĝeraj; en tio kuŝas la kontrastego.

Estas pruveble, ke la plejmultaj „krimoj kontraŭ la individuo“ estas kaŭzitaj de alkoholĝuo; ke 30% de l' viraj frenezuloj estas viktimoj de l' alkoholo; ke ĉiujare multaj familioj pereas pro alkoholo; ke multaj homoj malmoraliĝas pro alkoholo; ke plejparte prostitucio kaj seksaj malsanoj kaŭziĝas je alkoholo; ke racia „eŭgeniko“ t. e. homa bredelekto estas malebligata de alkoholo.

Kiu povas konsiderinte la senliman mizeron kaŭzitan en la mondo de la alkoholo kompari ĝin kun nikotino, kafo kaj teo? La komparo estas sensenca. Alkoholo estas ne trinkaĵo aŭ ĝurimedo, kiuj povas esti malutilaj laŭ cirkonstancoj, sed alkoholismo estas popolepidemio.

Trinkante nur iometon da alkoholaĵoj oni aprobas la frenezaĵon „alkoholismo“, sindonas al ĉi tiu popolmalsaneco kaj servas al tiu morala epidemio. Tio estas la alkoholproblemo. En ĝi tezas la tuta afero!

Spertante alkoholaĵojn sociala veneno oni komprenas, ke ĉi tiu fiaĵo devas esti kontraŭbatalata per socialaj rimedoj. La plej efika kaj plej radikala rimedo estus la nepra ŝtatleĝa malpermeso de alkoholaĵoj.

La timo pro malpermesa leĝo bazas ja nur sur persona percepto individua. La homoj pruvas milfoje, ke ili ne povas interne regi la alkoholemon, do oni devos elmondigi la malbonon ekstere. Sed kompreneble tia leĝo malpermesa ne povas esti dekretata de hodiaŭ ĝis morgaŭ.

En Usono oni laboregis senĉese 60 jarojn ĝis oni sukcesis. Tia laborado grandanima dum jardekoj devus esti ebla ankaŭ en ĉiuj aliaj landoj. Antaŭkondiĉo por ĝi estas propra abstinenco kaj klerigado. Ĉe multaj homoj estiĝas ilia percepto pri alkoholo el stulteco, primonda sensperteco kaj nekono prihoma.

Multaj sciencoj servas al la batalado kontraŭ alkoholo. La rezultoj de tiuj esploroj devus esti publikataj en ĉiuj rondoj de l' popolo. Jam la popol- kaj burĝlernejoj devas peri tiujn spertojn, por ke neniu junulo maturiĝu ne kompreninte la faktojn de alkoholismo. Oni ankaŭ efikus treege iom post iom per leĝoj limigante la alkoholkonsumon, ekzemple per malpermeso de alkohol-

importo kaj nepra alkoholmalpermeso je sabatoj kaj dimanĉoj.

Je la fino estu akcentata, ke samtempe kun la ekstera batalo devas okazi la interna venkado spirita per nia ekzemplo, per klerigado. Ĉiu unuopulo devus esti edukata, ke li abomenu ĝurimedojn, kiuj estas malsocialaj, ke ĉiu dumvive malaprobu principe la ebristaton laŭ plej detala senco, ke enigu al si ĉiurilate la ideon de sociala respondeco. La batalado kontraŭ alkoholaĵoj ĝuste perceptata ne estiĝas el iu malforto kaj ne signifas dependecon.

Male! Ni ne forgesu du eternajn verojn: „Homo estas neniam tiom forta, kiom se li protektas malfortulojn apogante kaj helpante ilin“ kaj „Homo neniam estas tiom libera, kiom se li regas propravole sin mem pro konsidero pli bona, pro kompato kaj amo!“ Esp. *Stephi Müller*-Wien.

MIGRADO.

Ĉiam mi ĝojas, se oni vokas al mi: „Elvenu sur herbejon kaj kampon, elvenu en arbaron kaj montaron, al la birdoj kaj al la kvarpiedaj loĝantoj de kampo kaj arbar'.“

Rapide mi metas miajn lernlibrojn en angulon, ekprenas la saketon kaj la migrobastonon kaj forkuras de la lokoj de l' homoj por plej baldaŭ esti sola kun la amataj floroj kaj birdoj, nenion aŭdi aŭ vidi de agoj de la homoj. Ĉiuj fibroj de mia koro tiras min plu en la solecon de la naturo, plu supren en la freŝan, senpolvan aeron de la montaro. Pli firme mi enfermas en mian koron la lumantajn florojn kaj la karajn, viglajn birdojn. Kien ajn mi rigardas, ĉie mi vidas belegan, netuŝitan naturbelecon.

Kiel malfeliĉaj kaj kompatindaj do estas tiuj, kiuj ne povas aŭ ne volas migri, kiuj neniam lernas koni kaj ami la naturon! Kiom bedaŭrindaj do estas ĉiuj, kiuj nun ĉe forno sidas en ĉambretoj aŭ devas stari en polvaj laborejoj. Kiom feliĉa estas mi kompare al ili! Estas ja malenviite al mi, vidi la miraklojn kaj belecojn de la mondo, admiregi pie la kreaĵon de Dio kaj aŭskulti al la grandegaj vokoj de la naturo.

Se donas Di' al vi favoron,
li sendas for vin el la dom',
por montri sian mirlaboron,
la belan mondon, al la hom'.
(*L. Zamenhof.*)

Eichendorff tre bele priskribis tion en poemo kaj mi mem sentas, ke ne ĉiu estas naskita por travagi la arbarojn kaj kamparojn gaje migrante. Kelka jam provis, sed baldaŭ li ekkonis, ke tiu ĉi amuzo ne estas kreita por li kaj la sekvontan posttagmezon li denove pasigis ĉe biero aŭ malantaŭ siaj libroj. Kelka trovis nur malfrue, ke la mondo ankaŭ por li ekzistas.

La altmontaro faras al mi multe pli grandan impreson ol mezmontaro aŭ ebenaĵo. Eble tial, ĉar ĝi enhavas pli multe da danĝeroj ol tiuj, eble ankaŭ, ĉar ĝi estas pli malproksime situa ol mezmontaro kaj ebenaĵo. Tamen, por tute kompreni kaj ami la montegaron, mi estas al ĝi multe tro fremda. Kiam kaj kie mi tamen povas, mi rapidas al ĝi, por serĉi la serenan kvieton de feliĉa migranto en ĝiaj floraj deklivoj, ĉe ĝiaj gaje saltantaj riveretoj kaj en ĝiaj malvarmetaj valoj. Fine mi trovas kontentecon en la trankvila soleco.

Ĉar migrante mi trovas refreŝiĝon, ĉar mia korpo devas labori en sana ageco; ĉar mi serĉas rifuĝon de la homaj persekutoj mi migras, kaj ne laste por konatigi al mi kaj ekami pecon de mia hejmlando.

Melankolie mi adiaŭas post horojn — kelkfoje tagojn longa kunvivo kun la naturo, mia amikino, kaj subakviĝas en la bruo de la urbo.

La memoron pri la ekstere vidita beleco mi konservas kiel multvaloran trezoron en mia koro.

R. Jonas (Edukejo Traiskirchen).

Atentu aldonon de firmo Hirt & Sohn, Leipzig. Vendejo por Aŭstrio R. Foltanek, Wien I, Ballgasse 6.

LA LOĜEJMIZERO EN WIEN.

Tiu ĉi grava socia problemo ekzistas en Aŭstrio depost la halto de la regula domkonstruado antaŭ pli ol dek jaroj.

Post la militfino la komunumo Wien energie klopodis per ĉiuj disponeblaj rimedoj, forigi tiun kulturdanĝeran mizeron. Antaŭ ne longa tempo la afergvidanta urbkonsilisto Anton W e b e r komunikis interesajn datojn pri tiu lia fako, kiujn ni parte prezentas al nia legantaro.

Je la fino de l' jaro 1923 estis anoncitaj ĉe Loĝejoficejo de Urbo Wien 64.069 loĝejserĉantoj, fine de 1924 — 68.858. La nombro do pligrandiĝis je 4789.

La du ĉefaj rimedoj aplikataj kontraŭ la loĝejmanko estas 1. la forpostulo de ne sufiĉe uzataj ejoj kaj ties disponigo al bezonantoj, 2. la konstruado de novaj domoj el publikaj monrimedoj ĉefe havigataj per aparta imposto.

Ĝis nun oni tiel forpostulis entute 12.388 loĝejerojn, inter kiuj estas 4629 ĉambroj kaj 2820 kabinetoj; la resto konsistas el kuirejoj, antaŭĉambroj, servistejoj kaj banĉambroj.

Konstruataj estis de la komunumo entute 3424 loĝejoj depost 1919, de ili 1503 nur en la jaro 1924; do en tiu jaro preskaŭ sammulte kiel en la antaŭaj 5 jaroj kune. Por tiu ĉi konstruado estas elspezitaj ĝis nun 559.963.510.600 K, t. e. laŭ nia nova monsistemo 55,996.351 S (ŝilingoj) kaj 6 g (groŝoj).

Krom la menciita loĝejkonstruimposto ekzistas alia interesa enspezofonto: la t. n. ekvivalentpagoj. Ili estas postulataj, se la loĝejoficejo rezignas je sia forpostulrajto. Tio okazas, se la adapto de loĝejo aŭ loĝejparto tro multe kostus aŭ la loĝeblo en ili estas iel malpliigita. En 1924 oni tiel enspezis la grandan sumon da 1,036.735 S.

La 1an de marto 1925 la nombro de loĝejon urĝe bezonantaj personoj estis 21.547; inter ili 1268 estas sen loĝeblo aŭ loĝas en ruiniĝantaj domoj.

La en ĉiuj distriktoj starigitaj imponaj novkonstruaĵoj dokumentas ne nur la zorgemon de la komunumo por la loĝejbezonantoj. Per tiuj konstrulaboroj miloj da senlaboruloj estis okupataj kaj tiel la komunumo ankaŭ helpas forigi la senlaborecon laŭ produktiga maniero.

Walter Smital-Wien.

MIRAKLA INFANO.

En la jaro 1725 mortis Christian H e i n e c k e n, kiu vivis nur kvin jarojn, sed tamen atingis grandan famon. Li naskiĝis en Lübeck. Kelkajn horojn post sia naskiĝo li jam parolis eĉ tre prudente. Dekmonata li kapablis diskuti kun plenkreskintoj pri la plej multaj temoj. Post unu jaro li konis ĝisfunde Malnovan Testamenton kaj post apenaŭ unu plua monato li aproprigis al si la konon de Nova Testamento. Dukajduonjara Christian scipovis respondi ĉiun demandon pri geografio kaj historio antikva kaj nova. Poste li lernis la lingvojn latinan kaj francan kaj parolis ambaŭ flue, kiam li en sia kvara vivjaro estis venigita al la dana kortego.

Pro sia malforta organismo li devis mamsuĉi ĝis sia kvina vivjaro kaj mortis, kiam oni provis demamigi lin.

El „Wiener Morgenzeitung",
trad. *B. Selzer*, Wien.

DIVERSAĴOJ.

Somera universitato en Esperanto okazos laŭ iniciato de nia d-ro P r i v a t en G e n è v e 31. jul. ĉis 7. aŭg. 1925.

La programo estos jena:

I. Psiko-analizo kaj pedagogio.
II. Historio kaj evolucio de la lingvo.
III. Internacia organiza juro.
IV. Elektro-tekniko kaj Radio.

Por programo kaj informoj skribu al la sekretario de l'Internacia Somera Universitato, 12, Boulevard du Théâtre, Genève (Svislando).

Va Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazos de la 11. ĝis 15. Aŭgusto n. j. en Wien. Adreso de la Kongreskomitato: Jos. S l e z a k, Wien, XX.. Ospelgasse 34/25. Kongreskotizo = Ŝ 2·—. La vigla, energia kaj celkonscia laboro de la gesamideanoj de la „Aŭstria Laborista Ligo Esperant-

ista", kiuj dum la XVIa U.E.-Kongreso aranĝis bonsukcesan laboristan Esp manifestacion kaj nun preparas la Van S. A. T.-Kongreson, estos denove grava antaŭenpuŝo de nia movado en Wien kaj Aŭstrio.

Internacia komercistaro (Asocio por komerco kaj helplingvo tutmondaj en Vieno), Sekretariejo, Wien, I., Sonnenfelsgasse 11, preparas por la internacia komerca konferenco en Paris (Majo 1925) kompletigon de sia adresaro kaj petas anonci: E-ajn komercistojn, industriajn aŭ metiajn entreprenojn, eksportistojn, bankojn ktp. kun E.-aj postenhavantoj kaj E-emajn personojn, institutoj, lernejoj k. c.

El Palestino ni ricevis la unuan numeron de nova E-a-Hebrea jurnalo „Eretz-Israel kaj Esperanto" (eld.: N. Havkin, del. de U. E. A. en Jeruzalemo) kaj leteron, laŭ kiu okazis du kursoj kun 90 studentoj en Jeruzalemo. Sukcese finintaj ricevis atestojn pri kapableco. Grupkunvenoj en kafejo Radio.

Benson School of Esperanto Newark, N.-J., Ameriko dissendis specimenpaĝojn de ilustrita lernlibro por E.

Interesa provo instrui la lingvon nur laŭ bildoj kun koncizaj klarigoj.

Aŭstruja Esperanto-Delegitaro

V-a Tutaŭstria Esperanto Kongreso en Salzburg komencos sabate 8. aŭgusto je la 20a kaj daŭros ĝis la 10. aŭgusto vespere.

Ĝi do estos aranĝata kiel Postkongreso de la XVII a

La Loka Kongreskomitato post interkonsento kun la ĉefaj grupoj oficiale invitas ne nur la aŭstrian Esperantistaron sed ankaŭ ĉiujn aliajn gesamideanojn al partopreno. La programo estos jena:

La 8-an de aŭgusto, sabate: 20-a, Salutvespero.

La 9-an de aŭgusto, dimanĉe: 10-a, Solena malferma kunsido; 14a, I-a Laborkunsido; 16-a, Ekskurso al Hellbrunn; 20a, Amuza vespero.

La 10-an de aŭgusto, lunde: 10-a, II-a Laborkunsido, poste Specialaj konferencoj; 14-a, Ferma kunsido, poste Gvidado tra la urbo; 20 a, Propagandvespero, Adiaŭo.

En la tagoj antaŭ kaj post la kongreso okazas ekskursoj al Königssee, Gaisberg, gigantkavernoj en Tennenmontaro ktp. laŭ deziro de la ĉeestantaj gastoj.

Kotizoj: 1 S. aŭ. por aŭstrianoj, 2 S. aŭ. por aliaj. — Adresso: E.-Kongreso Salzburg, Elisabethstraße 17.

Bonvolu baldaŭ anonci vin per almetitaj aliĝiloj kaj bezonokaze postuli pluajn.

Por A. E. D.:
Steiner, ĝeneralsekretario.

Al la E. grupoj kaj izoluloj en Niederösterreich (t. e. Malsupra Aŭstrio). La 9. majo 1925 okazos la fondo de „Landestraro por Niederösterreich" en St. Pölten, gastejo Zotti, Rathausplatz je la 3a pm.

Nepre necese estas, ke ĉiuj lokoj en Niederösterreich, kie ekzistas Esp-oj, estu reprezentataj tie aŭ almenaŭ anoncataj skribe al s-ro H. Lachmann, grupestro St. Pölten, Klosterg. 9.

Laŭ la regularo por A. E. D. „ĉiu Esperantista rondo aŭ societo en Aŭstrujo kun maksimume 20 anoj delegas en A. E. D. unu reprezentanton, kun 21—50 anoj du reprezentantojn; se ĝi havas pli ol 50 membrojn, ĝi delegas tri, ĉe pli ol cent membroj ĝi rajtas delegi kvar (pkto 6); „lokaj grupoj de ligoj ktp. minimume dekmembraj validas kiel memstare elektantaj societoj" (pkto 7); „ĉiu delegito devas esti lingvekapabla Espisto" (pkto 8); „la delegitoj devas ĉeesti persone aŭ anstataŭigi sin per alia delegito de la sama lando. Unu delegito tamen ne povas surpreni pri ol du anstataŭojn, tial ne havi pli ol tri voĉojn. Ĉiu anstataŭanto devas esti skribe atestita de la anstataŭiginta grupo". (pkto 20.)

Por A. E. D.:
Steiner, ĝeneralsekretario.

ESPERANTONUMERO De „ILLUSTRIERTE RUNDSCHAU".

La „Illustrierte Rundschau" (ilustrita revuo), konata aŭstria kultura kaj artisma revuo (redaktoro Cäsar Segalov) jus eldonis specialan poresperantan n-on kun multaj ilustraĵoj el la eksterlanda E.-

movado kaj portretoj de konataj aŭstriaj Esperantistoj.

La ĉefartikolon „La viro kaj lia verko“ verkis speciale por la gazeto la frato de nia majstro d-ro Leono Zamenhof. Krom tio ankoraŭ menciindaj estas: „Esperanto en la lernejo“ de kortega konsilanto d-ro F. Wollmann, landa lernejinspektoro en Wien; „Eŭropa ŝtatetemo“ de W. Kenn-Peking; „La spirito de Esperantismo“ de d-ro Hideo Yagi-Kioto kaj „La Esperanto-movado en Aŭstrio“ de W. Smital, prezidanto de la Wien-a Esp. Delegitaro.

Tiu valora publikigaĵo, kiu sendube efike akcelos la poresperantan propagandon en ĉiuj germanlingvaj landoj, estas redaktita de d-ro Emil Pfeffer, gazetara gvidanto de Aŭstrujo Esperanto Delegitaro.

Prezo de n-ro 60 aŭ. groŝojn ĉe la redakcio Wien, VIII., Kochg. 28.

ESPERANTO KAJ NACIA SENTO.

En la lasta gazetara konferenco kunvokita de „Ravag“ (Radio Verkehrs A. G. t. e. Radio-Interliga Asocio Akcia) deklaris sin unu membro en la plej akra maniero kontraŭ la enkonduko de Esperanto-radiokurso kaj difinis tiun lingvon kiel rimedo de sennaciigo, kiel danĝero por la nacia sento de Aŭstrianoj, kiu nur nun komencas vekiĝi.

Tre prave rimarkigas „Der Tag“ t. e. „La tago“, Wien-a gazeto en sia n-ro de l' 6. aprilo n. j.: Ĉar E-o laŭ sia esenco estas ne politika, do ĝi estu ankaŭ tiel traktata kaj oni ne faru el ĝi elirpunkton de politikaj disputoj por „Ravag“. Ĉar jam tre granda nombro de abonantoj postulas E-on, do „Ravag“ devas ĝin enkonduki en sian programon, ne lasante sin timigi per la falsalarmo de apartaj individuoj.

Ankaŭ „**Radiowelt**“, kies ĉefredaktoro d-ro Ladany ĉiam energie subtenas E-on, sin esprimis en la artikolo „Esperanto per radio-nenia demando de l'politiko“ n-ro 14 en simila maniero kontraŭ tia ŝovinisma rezono.

„**Radio Amateur**“ (ĉefredakt. Erb, Wien IX., Severingasse 9) raportas en ĉefartikolo (n-ro 14 de 2. aprilo) pri grava pliampleksigo de „Ravag“-programo aludante, ankaŭ la enkondukon de kursoj pri lingvoj. La aŭtoro instigas ĉiokaze la legantojn tuj sciigi sian opinion ĉu post la angla kurso estu enkondukata franca lingvo aŭ Esperanto.

Tiu ĉi ĵurnalo estonte ankaŭ raportos regule pri Esperanto.

Allgemeines Freies Radio (Ĝenerala Libera Radio) **Wien,** Redaktoro Ernst Wettreich, Wien, XX., Traunfelsgasse 3, malfermis Esperanto rubrikon! Ĝi estas la dua Viena Radio ĵurnalo kiu sub la gvidado de la estro de la gazetservo de Aŭstruja Esperanto Delegitaro d-ro Emil Pfeffer aranĝis konstantan Esperanto-rubrikon. La unua artikolo „Per Esperanto al mondradio“ estis de d-ro Winfried Fricke-Hannover, la dua „E. kiel internacia kumunikilo“ de d-ro Ernst Klimke-Berlin kaj la tria „Kio estis ĝis nun farita por la internacia Radio-interkompreno“ de Robert Kreuz Genève. De la kvara numero aperos Esperanto-kurso por Radio-amatoroj de d-ro Emil Pfeffer.

Estas do neniel dubinde, ke „Ravag“ jam en plej proksima tempo komencos la E-kurson, kiun ĝi jam principe konsentis.

Ĝenerala kunveno de la grupo St. Pölten, okazos la 9. majo n. j. en gastejo Zotti, Rathausplatz je la 17a.

Je la ½20a komuna ekiro en gastejon Weiss, Oberwagram (15 minutoj) al amuzvespero. Tie estos interalie prezentataj du teatraĵoj: „La milionheredaĵo“ kaj „Malsanulo pro imago“.

Kore invitas ĉiujn E-ojn

Hans Lachmann, grupestro.

E.-Societo por Stirio, grupo Leoben kunvenas ĉiun 1. kaj 3. vendredon de l'monato en la gastejo „Magyar, Kärntnerstraße“. Ĉiun ĵaŭdon kurso en burĝa lernejo.

Esperanto en Wels. Du grupoj, nome: Loka grupo de Aŭstria Laborista Ligo Esperantista (16 membroj; grupestr.: Karl Deisenhammer, Wels, Stadtplatz; kunvenoj sabate 17a—19a en gastejo Ploberger, Josefsplatz) kaj de Tutmonda Policа Ligo (12 membroj); grupestr.: pol. insp. Wimmer, Wels, policejo). Aranĝitaj 2 kursoj kiujn gvidas s-roj Karl Franz kaj Math. Hacker. En najbara Attnang: kurso de A. L. L. E. Entute 70 geesp.-istoj en Wels.

Kotizojn por A. E. D. kaj K. R. pagis: Bohema Klubo Esp. Wien XV., Esp. Societo Innsbruck, Esp. Soc. Lab. Innsbruck, Esp. Soc. Rattenberg (Tirol), Aŭstria Katolika Ligo Esp. VIII por po du; Esp. Societo St. Pölten, Polica Esp. Unuiĝo Wien VII. por po 3, Unua Esp. Unuiĝo Wien I. por 4 delegitrajtoj. — Donacoj de Esp. Del. de Tirol ŝil. 1.

Esperanto-Delegitaro de Wien

Wien, XXI., Am Spitz 14.

Aŭstria Katolika Ligo Esperantista

Wien, I., Kleeblattgasse 7, II. et., kunveno merkrede 5—7½; grupo Erdberg kunvenas sabate 4½—6 en Joanneum. III., Erdbergstraße 43; rondo „Gefrataro“ vendrede 6½—8½ en Josefssaal, XVIII., Gentzgasse; rondo „Verda Stelo“ en Kath. Gesellenverein, VI., Gumpendorferstraße.

La jarkunveno okazis 25. I. Ĉeestis la honora prez. P. Meštan. Estis reelektitaj ĉefhanto P. Wolfgang Nedwid prezidanto, s-ro Leop. Chiba kaj s-ino Emmy Kubin kiel gevicprezidantoj.

Kursoj okazis: 2 en 1a distrikto sub gvidado de s-ro ĉefhanto Nedwid, 1 en Erdberg de d-ro Walka, 3 inter ili 2 por infanoj de f-ino Dittrich, 1 ĉe Kath. Volksbund de s-ro Weber, 1 en „Calasantinum“ por kristanaj laboristoj de s-ro Mudrak. L'organo „St. Calaŭdiusblätter“ raportas ĉiam pri Esperanto kaj publikigas ankaŭ E-artikolojn

A. K. L. E. aranĝis festvesperon la 1. III. kun teatraĵo „Perfekta kuiristino“ kaj festparolado „Eperanto kaj la katolikoj“ de s-ro d-ro Walka. La 15. III. estis aranĝata festeno je honoro de Sankta Clemens Maria Hofbauer kun solena E.-diservo en Minoritenpreĝejo kun prediko de P. Meštan matene kaj festkunveno en salonego, I., Steindlgasse, posttagmeze kun teatraĵo „La verda papilio“ kaj kantoj, deklamoj.

Esperanto Junularo, III., Radetzkystr. 25, kafejo Molkereihof aranĝos paroladojn: 23./4. s-ro Altrichter, 30./4. f-ino Placzek, 7./5. s-ro Lackenbacher, 14./5. s-ro Scheidhauer, 21./5. s-ro Ultmann, 28./5 s-ino Müller.

Esp. Tischgesellschaft kunvenas ĵaŭdon 8a vesp. en kafejo Thomaschka, Währingerstrasse 150.

Unua Esperanto-Unuiĝo en Wien I., Weihburggasse 12 (Kasino). Paroladis 3. IV. mag. A. Taussig, 17. IV. s-ro E. Zoubek.

La 24. aprilo okazos solena disdono de „Unuiĝaj Diplomoj“ al la membroj apartenantaj jam de dek jaroj al tiu „Unuiĝo“.

Tutmonda Esperantista Ligo Fervojista

(T. E. L. F.)

Al niaj membroj!

Laŭ interkonsento kun la „Verband deutscher Eisenbahn-Esperantisten“ decidis la plejmulto de la anoj ĉesigi „T. E. L. F.“

Pro tio ne miru ne plu trovante TELF-rubrikon en „A. E.“ La restinta kasosumo laŭ decido de la disiga kunsido, okazinta en St. Pölten la 6an marto estis dedičita por la Zamenhof-monumento.

La estraro.

Univ. Esperantista Pacifista Ligo

Centro: Wien, I., Hofburg (Aŭstrio).

PRI MILITO.

Vian glavon eningigu; ĉar, kiu tuŝas glavon, devas perei per glavo.

Jezuo de Nazareto.

Se ankaŭ la efektivigo de l' eterna paco estus nur pia deziro, ni tamen certe ne trompiĝas akceptante la maksimon, senĉese labori por ĝi, ĉar tio estas devo.

Kant.

Lernigu al la infanoj malami la malamon. Edukfaru ilin prudentaj homoj, kiuj . . . kontraŭstaras la naciisman kaj imperialisman ambicion, kiu detruis iliajn patrojn. *Anatole France.*

En ĉiuj militoj temas nur pri ŝtelo.

Voltaire.

Neniam estis bona milito aŭ malbona paco. *Benjamin Franklin.*

En la plej longa paco la homo ne parolas tiom da sensencaĵoj kaj malveraĵoj kiel dum la plej mallonga milito.

Jean Paul.

Senarmigi sin aŭ perei, tio estas la dilemo por la eŭropaj nacioj.

Virchow.

Komp. kaj trad. *Senio Weingast*, Wien.

RIMARKINDAJ PRESAĴOJ.

Germana-Esperanto Konversacia Libro por uzo en lernejoj kaj en vojaĝoj kun vojaĝa vortaro de James Connor. Por la lingvo Esperanto prilaborita de Robert Kreuz kaj Max Butin. Eldonejo Julius Groos-Heidelberg, 1924.

Mi bedaŭras, ke oni komisiis min, recenzi tiun ĉi libron. Volonte mi kompleze servus al la du konataj aŭtoroj; sed se oni restu justa ...

Ses partoj: Gramatiko, dialogoj, skribaĵmodeloj, laŭsistema kolekto da vortoj, proverboj, laŭalfabeta vojaĝa vortaro.

Uzintoj de tiu ĉi libro scios multajn E-esprimojn; sed ili estos germanstiluloj.

W. Smital, Wien.

Anoncoj: Informojn pri prezoj postulu de la administrejo.

RADIO
BICIKLOJ KAJ
KUDROMAŜINOJ
PICK-WIEN
Centra magaz.: IX, Liechtensteinstr. 27
Filioj: IV, Wiedner Hauptstraße 10 kaj
VI, Gumpendorferstraße 67.
Oni parolas Esperante!

LIBROVENDEJO WALLISHAUSSER
(ELDONEJO PAUL KNEPLER)
WIEN I, LICHTENSTEG 1

ŜOLANDRO de Waldemar Bonsels. Tradukis d-ro Edm. Sós.
(Belega rakonto) . . . . . S 1.50 (Gm. 1.—)

LA PANEŬROPA MANIFESTO de d-ro R. N. Coudenhove-Kalergi. Tradukis d-ro Edm. Sós . . S —.60 (Gm. —.40)

VOLLSTÄNDIGER LEHRGANG der internationalen Hilfssprache Esperanto von J. Glück und Dr. Edm. Sós.
(10.—20. Tausend) . . . . . S 1.50 (Gm. 1.—)

Esperanto-Schlüssel, la plej bona propagandilo por germanoj.

Ĉiuj en Esperanto eldonataj verkoj estas riceveblaj ĉe ni.

SUKERAĴISTO
ANDREAS DEISTLER
Del. de U. E. A.
Wien, VII, Schottenfeldgasse 91
Granda elekteblo je sukeraĵoj, tortoj, bombonoj, ĉokoladoj k. t. p. por ĉiuj okazoj.

Eldonanto: Esperanto Unuiĝo en Korneuburg (Redaktoro: Hugo Steiner, Korneuburg, Hovengasse 12). — Presejo: Gesellschafts-Buchdruckerei Brüder Hollinek, Wien III, Steingasse 25.